


Simple senparola

***Langenscheidts "OhneWörterBuch"***
(Senvorta Vortaro de Langenscheidt), 1999
32 paĝoj, brile kartonita, 15 x 10,5 cm
DM 9.90 ( EUR 5.07) ISBN 3-468-20394-2

*"Habla aleman..., you speak deutsch..., parlez-vous allemand...?"* Tiel komenciĝas recenzo aperinta en la sama ĉiutaga loka periodaĵo pri poŝlibro en tipa flavkolora aspekto de la famaj *Langenscheidt*-vortaroj. La komentario en la rubriko "novaj kreaĵoj" daŭrigas:

*"Forgesu vian senhelpan balbutadon kaj frenezan gestikuladon, kiam vi dumferie serĉas restoracion aŭ bezonas helpon. En nia 'vida epoko' la afero povas bonefiki malpli komplika - nome tute senvorta. La renoma lingvoeldonejo Langenscheidt nun aperigis vortaron de tute nova tipo. La bone manipulebla 'Senvorta Vortaro' enhavas 500 desegnojn: de leterkesto ĝis rabista surprizatako, de moskitoreto ĝis pormatenmanĝa ovo. Ekmontro per fingro je la koncerna bildo - - kaj la mondvojaĝemulo povas komprenigi sin, ankaŭ fore de la grandaj vojoj de turistoj".*

Mi jam vidas min post surprizatako fare de ŝtelistoj en Napolo: sen mansako, sen pasporto, sen monujo - serĉanta per tremblaj manoj la koncernan bildon aŭ bildsekvencon laŭ informo de la 'senvortvortara enkonduko':

*"Se vi estas survoje en lando, en kiu vi ne povas interkompreniĝi, komuniku kion vi volas al via vidalvidulo jene: simple montru la koncernan bildon respektive indiku plurajn bildojn, unu post la alia. Se vi atendas respondon, tiam estas la vidalvidulo kiu devas per fingro indiki..."*

Mi neniam antaŭe estis tiom seniluziigita post aĉetado de libro. Ĉu mi, kiel Esperantisto, ne plu povas akcepti bonintencan solvon de la tutmondaj interkompreniĝproblemoj? Ne, tute ne. Mi ne opinias, ke mi estas tiuspeca 'fina venko fanatikulo'. Sed mi jam uzis la senvortan vortaron. Por elprovi ĝin. Mi kunprenis la libreton al Italio por 'kompletigi' miajn modestajn konojn de la Itala. La rezulto: fiasko. La tuta tempo forpasis kun fingroindikado. Mia edzino jam delonge solvis la nekomprenproblemon per manoj kaj piedoj, kiam mi - spite de daŭra fingroindikado - ankoraŭ estis tre, tre malproksima de la dezirita komunikiga celo.

Ŝajnas al mi, ke mi devas kunpreni tiuspecan "SenVortanVortlibron" al Afriko, en landon, en kiu neniu homo parolas alian lingvon ol sian propran langoklakan dialekton. Eble tiam mi urĝe bezonas bildon de iu bezonata objekto. Sed mi timas, ke tiu specifa objekto sur kiun mi *"point it"* per miaj fingroj tute ne estas konata al la indiĝenoj.

Jes, pri la apero de la libro sur la libromerkato mi estas simple senparola. Sed en la senco : esti konsternita, surprizita, ŝokita, ke renoma lingvoeldonejo publikigas tiuspecan 'vortaron'.

*R. Sachs*

# Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

**Por la trijara estrarperiodo 2000 ĝis 2003 nove elektita estraro de ISAE:**

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Prof. Dr. Rüdiger SACHS<br>Vor dem Brückentor 3, DE - 37269 - Eschwege |
| Estrarano | Prof. Dr. Heiner EICHNER<br>Lueger-Ring 1, AT - 1010 - Wien |
| Estrarano | Prof. Dr. HASZPRA Ottó<br>Húr. ul 9A, III.lph. 1/3, HU - 1223 - Budapest |
| Estrarano | S-ro SUGANO Takeo<br>6-5 Ohte-tyoo, Takatuki-si, JP - 569 - Oosaka-hu |
| Estrarano | Dr. Martin WEICHERT<br>c/o Chalmers Datavetenskap, SE - 41296 - Göteborg |
| Komitatano | S-ro Jaques JOGUIN<br>5, Impasse du repos, FR - 38100 - Grenoble |
| Komitatano A de ISAE ĉe UEA | S-ino Nina KORJENEVSKAJA-GOURIOU<br>Bat.C,L'Espiguette,Rue de Verdun, FR -13140 - Miramas |
| Kasrevizoro | Ing. Peter HAUSER<br>Pf. 401243, DE - 63277 - Dreieich |
| Kasrevizoro | S-ino Jutta BUSS<br>Sossenheimer Weg 53, DE - 65824 - Schwalbach |

**Landaj Delegitoj**

| | |
|---|---|
| Germanio | S-ino BUSS Jutta<br>adreso vd. supre |
| Japanio | S-ro SUGANO Takeo<br>adreso vd. supre |
| Kanado | Prof. Stevens T. NORVELL jr.<br>2, Windermere Rd., NS Halifax CA, B3M 1N9 |
| Pollando | D-rino LEWANDERSKA-QUEDNAU Alicja<br>Plömbacher Weg 21, DE 85410 Haag/Amper |
| Rumanio | D-rino BUTAN Maria<br>Aleea Sportivilor 34ap3, RO 1900 Timisoara |

**Landaj Perantoj**

| | |
|---|---|
| Aŭstralio | Libroservo AEA<br>143 Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W. |
| Brazilo | Brazila Esperanto Ligo<br>C.P.03625, BEL, BR 70084-970 Brasilia |
| Finnlando | S-ino KESÄLÄ Heta<br>Kalamihenkuya 3 D 32, FI 4300 Tuusula |
| Francio | S-ro TRÉBOUET Charles<br>Ferme de Monchy, FR 60390 Auneuil |
| Irlando | S-ino DAVIES Joy<br>9 Templeogue Wood, IE Dublin 6W |
| Korea Resp. | S-ro CHO Sung Ho<br>Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751 |
| Norvegio | Eldonejo Esperanto<br>Olaf Schous vei 18, NO 0572 Oslo |
| Svedio | S-ino ANDREASSON Lisbeth<br>Södra Rörum pl 455, SE 24294 Hörby |
| Usono | ELNA<br>P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530, USA |